

Gonxha Agnes Bojaxhiu naskiĝis en Skopje (Makedonio) la 26an de aŭgusto 1910 en albana familio. Pro la morto de la patro, la patrino strebis ebligi al siaj tri infanoj feliĉan infanaĝon kaj pro tio ŝi malfermis teksaĵvendejon.

Gonxha estis aktiva en la paroĥa vivo. Vokiĝon servi al mizeruloj ŝi eksentis kiel 12-jara knabino. Dum kelkaj postaj jaroj ŝi ne plu pensis pri tio, sed kiel 19aĝulino ŝi decidis forlasi la familian domon kaj iĝi monaĥino. Ŝia unua stacio estis monaĥejo Loretto en Ratfaarham en Irlando kie ŝi venis en septembro 1928. Al Hindio ŝi venis post du monatoj kie en la monaĥejo en Darjeeling ŝi novicis. La unuajn votojn ŝi havis la 24an de majo 1931 kaj la definitivajn la 24an de majo 1937. Dum kelkaj jaroj ŝi instruis en lernejo en Bengalio.

La inviton fari ion pli por mizeruloj ŝi ricevis dum la trajna vojaĝo de Kolkato al Darjeeling, la 10an de septembro 1946. Tio instigis ŝin fondi novan kongregacion kiu pli intense zorgos pri tiuj kiuj havas nenion, kiuj estas forlasitaj de ĉiuj. Ŝia peto servi ekster la monaĥinejo estis unue aprobita de la loka episkopo kaj la 8an de aŭgusto 1948 ŝia peto estis akceptita en Romo. De tiam ŝi vestis simplan vestaĵon, tradician vestaĵon de la hindaj virinoj.

Ŝi fondis lernejon por malriĉaj infanoj. Komence ŝi havis 5 lernantojn, sed rapide la nombro da lernantoj kreskis en plej malriĉaj urbaj kvartaloj. Ŝian ekzemplon komencis sekvi kelkaj junulinoj, la unua estis ŝia eksa lernantino. Paralele kun la instruado, ili vizitadis malsanulojn. Plej superaj ekleziaj instancoj agnoskis novan kongregacion «Misiistinoj de la karitato» la 7an de oktobro 1950. Krom la kutimaj tri votoj de la monaĥina vivo, la

misiistinoj havas ankaŭ la kvaran: servado al mizeruloj plenkore sen rekompenco.

La misiistinoj festas la 10a de septembro kiel «Tagon de la Dia Voko» memorigante la tagon en la jaro 1946.

Sekvis fondo de la hejmo por la mortantoj «loko de pura koro» kaj pli da hejmoj por mizeruloj, forlasitaj kaj malsanaj infanoj. La misiistinoj helpas al ĉiuj kiuj bezonas helpon, senkonsidere el nacio kaj religio.

La unua misiista hejmo eksterhindia estis fondita en Venezuelo en la jaro 1965. Sekvis pliaj tra Eŭropo kaj Afriko. Ĝis la 80aj jaroj la misiistinoj servis tra la tuta mondo.

Pro sia agado por la plej mizeraj, Patrino Tereza ricevis Nobelpremion por la paco en la jaro 1979. En la sama jaro la kongregacio havis jam 158 filiojn tra la mondo kaj komencis malfermadi siajn domojn en komunismaj landoj. La unua estis fondita en Zagreb kaj la dua en orienta Berlino. Malgraŭ multaj streboj, la misiistinoj ne sukcesis fondi sian filion en Ĉinio.

Vojaĝante tra la mondo, Patrino Tereza renkontis plurajn gravajn kaj respondecajn personojn kiujn ŝi impresis per sia obstino kiel porparolantino de la tutmonda mizerularo. En oktobro 1985 ŝi parolis okaze de la 40a datdeveno de la Unuiĝintaj Nacioj.

En la jaro 1997 al la kongregacio apartenis ĉ. 4000 monaĥinoj en 600 domoj en 123 landoj de la mondo. Ŝi iniciatis ankaŭ fondon de la vira kongregacio de la misiistoj, al kiu en la jaro 1997 apartenis ĉ. 400 monaĥoj, 15 pastroj kaj 35 kandidatoj.

Post streĉa jaro de vojaĝoj, la 5an de septembro 1997 Patrino Tereza mortis en Kalkuto. Ŝia korpo estis entombigita la

13an de septembro per plej altaj ŝtataj honorigoj.

La 23an de oktobro 1997, la ĉefepiskopo de Kolkato direktis leteron al la Konsilio pro la proklamo de beatuloj kun la peto pri rajtigo komenci la ekzamenadon ne atendante kvin jarojn post ŝia morto. Oficiale la proceso komencis la 26an de septembro en Kolkato. La proceso finiĝis en aŭgusto 2001. La dokumentaro konsistis el 80 kolektaĵoj, ĉiu kun ĉ. 450 p. La solenan proklamon de la heroecaj virtoj kaj dekreton pri la miraklo okazita dank' al ŝia porpreĝo la 20an de decembro 2002 ĉeestis la Papo.

Papo Johano Paŭlo la 2a beatigis ŝin la 19an de oktobro 2003, dum la dimanĉo kiun oni en la tuta mondo celebras kiel misiistan dimanĉon. Ĉi okazaĵo estis la centra parto de la celebrado de la 25-jara jubileo de la papeco de Johano Paŭlo la 2a.

La santproklamo okazis la 4an de septembro 2016 far papo Francisko.

PENSOJ DE PATRINO TEREZA

Mia plej granda premio estas ami Jesuon. Li estas por mi ĉio. Li estas mia vivo, mia amo, mia premio, mia ĉio.

Nur tiu kiu preĝas kaj amas per pura koro povas trovi Dion.

Jen nia vokiĝo: per niaj vivoj kaj atestoj ni igu Dion ĉeesta en la hodiaŭa mondo.

Ni estu fidelaj preĝantoj de la rozario. Ni preĝu ĝin pie. Ne gravas kiom da rozariobidoj ni preĝas, samkiel ne gravas kiom da tempo ni uzas por la preĝo, gravas

la pieco kaj la maniero per kiu ni preĝas ĝin.

Ni posedas nenion kaj sekve ni ne devas zorgi pri io. Se vi pli posedas, vi devas pli zorgi, se vi malpli posedas, vi estas pli libera. Malriĉo estas por mi libero.

Feliĉo estas bezono, granda donaco por aliaj, sed ankaŭ por ni mem, fajrero de amo kiu flamas. Ĝojo estas preĝo, ĝojo estas forto, ĝojo estas amo el servado.

Rigardu tabernaklon – komprenu la signon de la amo. Demandu vin: Ĉu mi komprenas tion? Ĉu mia koro estas tiom pura por vidi ene Jesuon? Trovi Jesuon signifas trovi pacon. Tempo kiun ni uzas por ĉiutaga preĝo kaj dialogo kun Dio estas plej valora parto de la tago.

Ni ĉiuj estus sanktaj, se ni bone plenumus nian laboron.

Ĉiu inter ni estas kreita por iĝi sankta. Ni estas kreitaj por la sama celo: ami kaj esti amata. Ni estas kreitaj por grandaj aferoj. Dio montras sian grandecon uzante nian neniecon. Mi ĝojas ĉar vi vidas Jesuon en mi, ĉar ankaŭ mi vidas Lin en vi. Ekzistas unu afero kiun ni ĉiuj devas apliki: superregi niajn timojn.

Ne gravas kiom vi laboras, sed gravas kiom da amo vi investas en tio kion vi laboras kaj kiel vi tion donacas al aliaj. Provu ne juĝi la homojn. Se vi prijuĝas ilin, vi ne transdonas la amon.

Se ni deziras konkeri la mondon, ni ne povas tion fari per bomboj. Ni konkeru la mondon per nia amo. Ni interplektu propran vivon per ĉenoj de ofero kaj amo, ĉar tiel eblas konkeri la mondon.

Labori aŭ vivi sen amo estas sklaveco.

Kelkaj preĝoj de Patrino Tereza troveblas ĉe la ttt-paĝo:

<http://www.ikue.org/pregh.html>

PREĜO

Jesuo, vi la Patrino Tereza igis inspirita ekzemplo de forta kredo kaj granda amo, eksterordinara atestantino de la spirita infanaĝo kaj granda kaj estimata instruistino de la valoroj kaj digno de ĉiu homa estaĵo. Ni preĝas, donu al ni povon honori kaj sekvi ŝin kiel sanktulinon de la Eklezio.

Elaŭdu la preĝojn de ĉiuj kiuj petas pri ŝia porpreĝo kaj aparte la peton kiun mi nun prezentas ... (ĉi tie menciu la peton por kiu vi petas la porpreĝon).


Faru, ke sekvante ŝian ekzemplon ni respondu al via soifkrio de la kruco kaj per ĝojo ni amu vin kaŝitan en la personeco de la plej mizeraj inter la mizeraj, aparte al tiuj kiuj estas plej malmulte amataj kaj dezirataj.

Tion ni petas en via nomo kaj pere de porpreĝo de Maria, via patrino kaj patrino de ni ĉiuj. Amen.

Dua kompletigita eldono okaze de la sanktproklamo la 4an de septembro 2016

Kompilis:
Marija Belošević
IKUE reprezentanto por Kroatio
Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio

SANKTA PATRINO TEREZA EL KOLKATO



***Hodiaŭ vivi kristane estas
tre malfacile kaj tio
ne eblas sen preĝo.***